秋の勉強会 11 月 13 日 午後 1 時 かでる２・７開催予定

Kirikae H. skribas: Mi naskiĝis en Sapporo 1954, kaj homiĝis en norda urbeto Engaru, aine *Inkar* [ʔíŋkaɾ], en la okhocka regiono. Ne Sapporo, sed *Inkar* estas mia hejmloko. Iama *Inkar* estis riĉa kaj viva urbeto. La loĝantoj estis junaj kaj viglaj, kaj laboris esperplene. Neniu kredus min, se mi dirus, ke tri kinejoj estis en tiu urbeto antaŭ 50 jaroj. En unu el ili, *Kinema Haŭsu*, staranta najbare de la domo de miaj gepatroj kun unu alia domo intermete, oni ludis "okcidentajn filmojn," verdire, *Hollywood*-ajn filmojn. Miaj gepatroj malpermesis la gefilojn spekti kinojn. Malgraŭ la zorgema doma eduko, mia homeco estis difektita konsiderinde, ĉar mi vidadis fotojn, angle *still pictures*, sur la muro de la kinejo dum la unuaj dek jaroj el la tuta vivo. Kiam mi estis en la tria lernojaro, 1962, *Cleopatra* venis nian urbon.

春寒賜浴華清池
温泉水滑洗凝脂

Mia patro decidis forlasi la urbeton kaj ni translokiĝis al Ĉiba 1964, kiam mi estis en kvina lernojaro. Tute malsama vivo komenciĝis. En la jaro 1971, iun tagon mi legis *Kanton de Senfina Bedaŭro* en klaso de la klasika ĉina lingvo. Tiam mi estis 17-jaraĝa kaj lernis en la tria jaro de alta lernejo. Kiam miaj okuloj kaptis jenajn versojn, longe dormanta memoro vekiĝis subite. Mi rememoris tute forgesitan scenon de banado de *Elizabeth Taylor*, kiun mi vidis en foto sur la muro de *Kinema Haŭsu* kiam Kleopatra venis.

. . . ‖ *Imperiestro ordonis fari banejon en Florpura Palaco, kaj donis ĝin al ŝi fruprintempe.* ‖ *Akvo el varma fonto fluis glite sur ŝia haŭto tiel blanka kiel solida graso.* ‖ . . .

Mi miris ke en la 9-a jarcento Ĉinoj jam konis belon, kiun *Hollywood* trovis apenaŭ en la 20-a jarcento.